

Leterujo, 3-a parto
Claude Gacond, 242-a radioprelego, 1968.05.29 & 06.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon restis leteroj en nia leterujo. Pro tio ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj.

A.- Jen el Nederlando vivsignoj de fraŭlino W. Steffering en Molenpad kaj sinjoro W. Böttcher en Leeuwarden.

Cl.- El Britio venis salutoj de gesinjoroj B. Najbaro en Keighley [kiihslei] kaj gesinjoroj Alice kaj Walter Peake en York. Kiel izolitaj esperantistoj ili ŝatas la radioelsendojn. Aŭdu :

A.- *“Ni ne konas aliajn esperantistojn en York kaj ni bone scias, kia granda valoro la disaŭdigoj estas al izoluloj. »*

Cl.- El Ĉeĥoslovakio ni ricevis longan kaj interesan leteron de sinjoro Jiri Patera en Prubezna.

A.- Kiel ni promesis, ni sendis al la geaŭdantoj, kiuj skribis sian ŝaton pri niaj historiaj prelegoj, ekzemplerojn de la gazeto *Sennaciulo*, kiu publikigas niajn studojn. Nia ĉeĥoslovaka samideano, kiu esprimis sian ŝaton por niaj temoj estas tiel unu el la ricevintoj de tiu sendo. Aŭdu lian miron :

Cl.- *« Mi estis tre agrable surprizita, kiam mi ricevis la sendaĵon, kaj mi ne sciis klarigi al mi, pro kio mi meritas la noblan donacon. Mi akceptis la sendaĵon kiel donacon, ĉar mi ne povas pagi al okcidento per nia mono. Mi jam tralegis ĉiujn kajerojn kaj eksciis multon interesan. Nekomprenbla estas por mi la politiko kaj ideologio de SAT, ĉar ĝi laŭdas Markson kaj insultas Sovet-Union, kun aprobo rememorigas la Oktobran Revolucion, kondamnas la militon en Vjetnamio, subtenas Israelon kontraŭ araboj, ktp... Do la sinteno de SAT multflanke plaĉas al mi same kiel malplaĉas. Tamen estas interese kaj certe utile legi kaj kompreni alies opiniojn. Pro tio mi kun ĝojo ekvidis en la lasta numero informon, ke en Ĉeĥoslovakio funkcias kiel SAT-peranto sinjoro Zyka. Mi tuj skribis al li kaj ricevis de li respondon. Mi fariĝos SAT-ano, kvankam mi ne tute konsentas kun la politiko de SAT, kaj mi ankaŭ ricevados la organon Sennaciulo. Kaj mi antaŭĝojas, ke mi trovos tie plurajn artikolojn transprenitajn el la esperantaj elsendoj de la Svisa Radio. »*

A.- Tiuj diroj estas interesaj. Unue vi sciis, ke nia radio faras nenian propagandon. Ni elektis *Sennaciulon* por niaj artikoloj, kiel ni estus povintaj elekti alian esperantan gazeton. Ni pensas, ke se ĉiuj interesaj prelegoj, kiuj estas efemere prononcitaj en niaj radioelsendejoj, povus esti poste transdonitaj al niaj gazetoj, tiuj gazetoj fariĝus pli allogaj. Kaj ni pensas, ke tiu kunlaboro inter niaj esperantaj elsendejoj kaj nia esperanta gazetaro povus multe vigligi la esperantan vivon.

Cl.- Kio nin interesis en la reago de nia ĉeĥoslovaka samideano, estas la miro, ke laŭdantoj de Marks povas esti kritikantoj de Sovet-Unio, ktp...

A.- Oni ne devas forgesi, ke la socialismo estas io multe pli vasta, ol la oficiala ideologio reganta en kelkaj landoj, kiuj sin proklamas socialistaj.

Cl.- Pri la milito inter Israelo kaj la arabaj landoj oni devus esti tre singarda en sia apogo. Kiom da registaroj blinde apogis la arabajn landojn, nur ĉar en iliaj teritorioj troviĝas petrolo ? Tion ni scios post kelkaj jaroj, kiam la pasioj mallumiĝos.

A.- Pro tio ni pensas, ke SAT plenumas en Esperantujo utilan rolon permesante diskutojn pri temoj ofte iom tabuaj.

Cl.- En Svislando ekzistas ekzemple du tendencoj kontraŭ la milito en Vjetnamio. Unu estas reprezentata de la pacistoj, kiuj estas kontraŭ ĉiu uzo de perforto por solvi la nunajn problemojn. Alia volas profiti tiun militon por miskreditigi Usonon profite al Ĉinio aŭ alia lando. La unuaj pensas, ke kulpuloj ne nur troviĝas en unu sola batalantaro, la aliaj volas nin kredigi, ke en unu flanko troviĝas nur herooj, dum en la alia misagas nur banditoj.

A.- Ni, esperantistoj, devas stari super tiuj simpligoj. Ni devas ekprovi koncepti la mondon sennacie.

Cl.- Fraŭlino Olga Thander en Pietarsaari, Finnlando, kiu estis ricevinto de nia sendo, skribis sian dankemon kaj diris la severecon de la vintro en tiu norda lando.

A.- Resalutis unu jugoslavo, kies nomon ni denove ne povas legi. Tiun ĉi fojon ni povas deĉifri, ke li loĝas en Ljubljana, Kersnikova 8. Eble venontan fojon li akceptos klare skribi eĉ sian nomon.

Cl.- Tiu jugoslava samideano sin demandas, kial ni france akcentas la vorton **Zamenhof**, dum plej ofte oni ĝin germane akcentas **Zamenhof**?

A.- Ni respondu, ke ni estas franclingvanoj. Por ni estas tre malfacile meti la akcenton sur la unua silabo de vorto. Plie en esperanto la akcento falas sur la lasta silabo de la radikoj. Oni devus diri Zamenhofo kun akcento sur **of**, pro tio ni konsideras, ke la akcento logike devus fali sur la lastan silabon de la propraj nomoj, kiuj ne finiĝas per **o**. La adjektivo fariĝas zamenhofa, kun akcento sur **of** kaj ne sur la unua silabo **za**. Jen nia senkulpiĝo. Laŭ ni, ne nur la germana uzo devas decidi, sed eble ankaŭ la pola, ĉar Zamenhof vivis en Pollando. Eble polo povos klarigi, kiel li vidas la aferon.

Cl.- El Hungario ni ricevis saluton de sinjoro Pal Balkanyi en Budapeŝto. El Svislando de fraŭlino H el ene Chavan en Lausanne.

A.- Salutis ankaŭ sinjoro Vojslav Pytloun en Liberec, Ĉeĥoslovakio, fraŭlino Imelda Wuyts en Antwerpen, Belgio.

Cl.- Por fini de la sama urbo ni citas alian mesaĝon de sinjoro Jo Haazen. Tiu samideano, kiu estas karilonisto ŝatus scii, kie en Svislando troviĝas sonorilaro, sur kiu oni dum la somero plurfoje koncertas.

A.- Li verŝajne aŭdis rakonti pri la karilono de la ĝeneva katedralo. Sur ĝi karilonisto ludas faman melodion de Jean-Jacques Rousseau : « *Allons danser sous les ormeaux* » kaj aliajn konatajn kantojn.

Cl.- Nia samideano faras plurajn aliajn demandojn pri la edukistino Montesori, pri la infanet-edukado kaj pri la svisaj pentristoj. Ni notas tiujn temojn por estontaj prelegoj.

A.- Ni finas hodiaŭ nian senpretendan babiladon dankante ĉiujn niajn geaŭdantojn, kiuj donis vivsignon. Nia leterujo malpleniĝis. Al vi ĉiuj labori al ĝia replenigo.

Cl.- Vi aŭdis babiladon el Svislando. Parolis Claude kaj Andr ee Gacond.  gis reaŭdo !

-oOo-